



# Komencanto

## Kiel tio komenciĝis

Rakontas d-ro Aleksandr Melnikov, vaste konata E-instruisto, aŭtoro de la metodiko "Instruado sen turmentado".

## Verkoj de niaj legantoj

Lirike kaj filozofie – diversĝenraj verkoj; de aŭtoroj el diversaj landoj. "Apud la Sejno" – unua provo verki teatraĵon.

## Gramatiko serioze kaj ŝerce

La 13-a gramatika leciono de J-L Tortel. Eseo pri la lingva personeco de tipa esperantisto el la libro de d-ro A.S.Melnikov

## Humuraj paĝoj

"Vespere, post laboro" humura teatraĵeto. Anekdotoj.

## La praktiko

Movado sen nomo.

## Korespondu!

Petrova Jelena [Magnitogorsk., Rusio]



*Ni lernu Esperanton!*

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2007

julio – aŭgusto

4 (66)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorská 1, CZ-696 62 Strážnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,  
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-  
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,  
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Mi-  
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković  
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-  
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.  
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-  
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalia** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,  
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —  
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El  
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj! Ni pardonpetas, ke tiu ĉi-numero tro mal-  
fruis kaj tre dankas pro via pacienca atendo.

Sur la paĝoj de la revuo ni plezure prezentas ĉi-foje per-  
sonon, kiu sindone sindediĉis al noblaj celoj de nia movado  
kaj ne nur aktive movadumis, sed konstante instruis nian ling-  
von, verkis kelkajn instruajn librojn kaj la propran metodikon  
"Instruado - sen turmentado!". En la 2004-a li sukcese dok-  
toriĝis per disertacio pri lingvokulturologiaj aspektoj de inter-  
naciaj planlingvoj kun ĉefa atento al Esperanto. Tiu valorega  
por nia movado persono estas profesoro Aleksandro  
S.Melnikov. Legu la historion de lia esperantistiĝo, skribitan  
en viveca kaj sprita stilo.

En "Verkoj de niaj legantoj" vin atendas diversformaj  
literaturaj provoj de la aŭtoroj el diversaj landoj: tio estas kaj  
traduko de franca kanzono, farita de Martin Ginette, kaj mal-  
longaj lirikaj prozaĵoj de jam konataj al vi rusiaj aŭtoroj, kaj  
traduko de bela, prinatura skizo, farita de Andrej Naumov, kiu  
kuraĝe debutis en la antaŭa numero de "K" kaj daŭrigas nun.  
S. E. Bullo el Italio multfoje kontribuis por la revuo per di-  
versĝenraj verkoj: poemoj, rakontoj, noveloj, bildoj. Ĉi-foje ŝi  
provis sin en tute nova ĝenro kaj verkis teatraĵeton, kiun eĉ  
eblas surscenigi kaj rolludi dum iu E-aranĝo.

En la gramatika rubriko J-L. Tortel daŭrigas *paŝo post  
paŝo* prezenti sian prigramatikan "romanon", kies freŝajn  
ĉapitrojn ni mem kaj espereble vi, karaj legantoj, atendas ĉiam  
kun granda intereso. Eseo de A.S.Melnikov pri lingva per-  
soneco de "tipa esperantisto" kompletigas la rubrikon ĉi-  
numere.

Espereble vin amuzos gaja dialogo "Vespere, post la-  
boro", esperantigita de nia juna aŭtorino Arina Osipova kaj  
anekdotoj el la humura revupartito.

En "La praktiko" ĉi-foje temas pri la societo "Movado  
sen nomo", kiu dum pluraj jaroj praktike uzas nian lingvon en  
sia porhoma agado kaj kies "levilkartojn" kun saĝaj kaj prip-  
ensindaj aforismoj iuj el vi eble jam ricevadis.

Agrablan legadon!

la redakcio

## Komencanto

2007 numero 4 // (66) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

abontarifo por 2008:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](#)

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яш. 132.

*Doktoro Aleksandro S. Melnikov estas vaste konata E-instruisto kaj E-aktivulo. Dum multaj jaroj aktivis kiel prezidanto de E-klubo en Rostov-Don (Rusio), kiel prezidanto de SEJM (Sovetia Junulara Esperantista Movado) en 1978-79, kiel TEJO-komitatano. Diplomita Ĉe-instruisto profesoro A.S. Melnikov, instrui(a)s Esperanton per la propra metodiko "Instruado – sen turmentado!" en pluraj urboj de Rusio, en Eŭropo kaj en NASK (Nordamerika Somera E-Kursaro). En 2004-a A.S. Melnikov habilitaciigis per disertacio pri lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj kun ĉefa atento al Esperanto. Verkis multajn metodikajn kaj instruajn librojn pri Esperanto, la lasta el kiuj "Esperanto - lingvo de kulturo kaj personeco" aperis en 2007.*

## Esperantio – kion ĝi al mi donis kaj kion de mi prenis


**T**umultante inter la ĉiutagaĵoj oni haltas por pri-pensi sian propran vivon nur en iuj specialaj momentoj. Por esperantisto unu el tiuj povas esti ekrajto aparteni al la Veterana Esperantista Klubo (VEK). 2005 estis por mi ĝuste tiu jaro: la 40-a datreveno de mia esperantistiĝo.

Kiel tio okazis? Tute senorkestre, senjubile kaj mi dirus, eĉ grizece. Panjo venis hejmen kaj sciigis al mi, ke ŝi vidis en la urbo reklamon pri kurso de Esperanto en la loka Pionira palaco.

La unua leciono estis ege populara. Grandega aŭlo ŝajnis malvasta. Por la senpaga kurso enskribiĝis ĉ. 100 lerneĵanoj. Antaŭ ni aperis modesta olduleto kaj senemocie, didaktike mallerte, sensuke kaj sentruke komencis tede klarigi la sekretojn de la "mirakla" lingvo. Sekvalecione ni sentis plivastiĝon de la salono: venis apenaŭ duono de la unuataga entuziasmularo. Baldaŭ restis 20 – kaj ni transiĝis el la aŭlo en klasĉambro, sekvis 10-kursaneco, 5 kaj... finale nia leciona ĉambro estis jam evidenta "aerodromo", ĉar tie sidis nur 2 potencialaj adeptoj de la Majstro.

Kial mi ne sekvis la aliajn? Ja kia plezuro povus esti por 14-jarulo aŭskulti seningeniajn lingvo-prezentojn de iu maljunulo? Tion mi, verŝajne, neniam ekscios. Eble, min flatis atento flanke de la instruisto (adoleskuloj ja bezonas maturaĝajn amikojn), eble, mi senkonscie aprecis lian tuj videblan amon al Esperanto, eble, ĉar mi sentis bonkorecon de V. S. Baranov. Plej verŝajne, ĉio ĉi kune kaj intereso al la efektive mirakle demokratia kaj kreiga kompare kun la jam gustumita, angla lingvo. Ĉiel ajn, la fakto restas, ke en 1968 la instruisto proponis al mi (tiam lernanto de la lasta klaso de mezlernejo) ekgvidi la unuan en mia vivo E-rondeton. Tio estis defio, eble mejloŝtona en mia E-biografio. Kaj unua ektimo de mia panjo. Lastaklase necesas multe lerni por studentigi. Sed mi daŭre okupiĝis pri E-o anstataŭ la devigaj lecionoj...

Kompreneble, mi instruis fuŝe. Tamen eĉ tiu agado ne estis malutila: aliaj lerneĵanoj favore



akceptis instruiston el "la siaj". Mi mem faris la unuan paŝon profunden al la lingvo (ja ĉiu leciono estis elprovo de miaj scioj – do, necesis prepariĝi anticipe). Tiel mi pli kaj pli penetris en la misterojn de la lingvo.

Miaj studentaj jaroj pasis interese: mi aktoris en la amatora teatro, daŭre instruis E-on, viglege korespondis (entute mi leterumis kun duoncento da homoj el kvindeko da landoj) kaj enuegis ĉe la ĉefstudado. Tiam venis la dua timo de panjo. Ja ĉiufoje, kiam ŝi demandis mian patron, kion mi faris dum ŝia foresto li respondadis: "Pri la sensencaĵo okupiĝis". Ne estis tiel, ke li malŝatis E-on, sed li ne vidis sencon en tiu "ludilo"... Patrino timetis...

Fine de la 2-a studjaro mi firme decidis: necesas ŝanĝo. Sed la alternativoj estis ne multaj: aŭ mi tuj forlasas la universitaton kaj same tuj devige militservas (tiel perdante 2-3 jarojn de mia vivo, depende de la arme-tipo) aŭ post 3 jaroj finas la universitaton

kaj havante “enmane” profesion, denove studentigās por... verki disertacion pri E-o. Mi elektis la duan varianton.

Sed kie studi? E-o ja ne estas oficiala disciplino. Sekve restas nur du eblecoj: la rusa lingvo kaj literaturo aŭ la angla (ambaŭ koncernas lingvistikon, do rajtigas verki ĉi-kampe disertacion). Mi preferis la duan.

La 70-a estis por mi denove mejloŝtona. Unuafoje en la vivo mi veturis al eksterlando. Timego netransdonebla: kaj se oni tute ne komprenus mian E-on en Hungario... Feliĉe, ĝuste tio ne estis problemo. Unuafoje en la vivo mi proprasperte konvinkigis: E-o ja taŭgas! Kia elano kaj jubilo! Por ekvilibrigi la plezuron la sorto trafis min... en Hungarian policejon pro tio, ke mi lasis la pasporton en Budapeŝto, mia “ĉefgastejo”, kaj veturis rigardi E-bibliotekon en Szeged'o. Naiva, mi supozis, ke tiel la pasporto estus en pli sekura loko ol en mia poŝo. Rezultis aresto kaj klaŭnecaj okazintaĵoj en la policejo, kie neniu parolis ruse, angle aŭ E-e (lingvoj, en kiuj mi kapablas komuniki). Tio sekvigis vere iun teatrekan farson kun abundo da gestoj, mimikaĵoj kaj, supozeble, miskomprenoj. Komence tio amuzis min, sed, kiam dum paro da horoj oni plurfoje pridemandis min kaj plurfoje enkarcerigis, la humoro iom ŝrumpis. Feliĉe, post certa kontrolo al la policaj suspektoj venis fino kaj mi... ekde tiu tempo ĉiam kunhavas la pasporton kaj rememoras la incidenton kun rideto. Mi, ĉiama bonkonduktulo kaj preskaŭa modelulo – kaj en karcero! Amuze. Postaj vojaĝoj tra la mondo alportis multajn aliajn travivaĵojn, kiujn mi priskribis en libro kaj pluraj artikoloj (cetere, gajninte kelkajn etajn ĵurnalistajn premiojn).

En 1974 okazis du pliaj gravegaj E-eventoj. Unue mi (tiam 23-jara, ĵus postuniversitata instru-

isto pri kemio) eksciis, ke en Estonio loĝas akademiano P. Ariste, kiu okazigas ekzamenojn pri Eo ĉe la Tartua universitato. Ĉar en nia lando (sed, ŝajne, ne nur nia) oni adoras diversajn paperaĉojn, mi decidis ricevi tiuspecan sciateston. Do, mi skribis al la profesoro kaj ricevis inviton. Tiun ekzamenon mi memoros ĉiam. Mi – simpla junulo, kies sola merito estas havo de jardekoj antaŭ si. Li – unu el la plej estimataj homoj de Estonio, renoma lingvisto, membro de la Estona, Hungara kaj Finna scienc-akademioj (dum certa periodo ankaŭ de la Akademio de Esperanto), poligloto, kiu diversgrade posedis kvardekon da lingvoj. Lia unua demando: “Ĉu vi bezonas mian helpon pri tranoktejo?”. La dua frazo: “Por ke vi ne sentu en la urbo solece, konatiĝu kun mia disertanto. Mi petos lin helpi kaze de neceso.” Tiel mi ricevis “personan adjutanton”. Poste la akademiano invitis min al la universitata kafejo por... ekzameniĝi. Li ĝentile parolis kun mi E-e pri tio kaj jeno, faris paron da formalaj demandoj kaj diris, ke mi meritas kvinon (la plej alta poento). Ĉio ĉi vere estis por mi eksterordinara sperto. Kiu estis li kaj kiu mi?! Sed li eĉ foje ne montretis sian senduban superegecon. Afabla, zorgema pri aliulo, ĝentila, saĝa... Mi povus epiteti senlime kaj ĉiam nur kun varma kaj danka sento. Tio estis mia unua renkontiĝo kun tute fremda super-supera socie sed tiom eke kaj ege proksima anime esperantisto.

La dua evento faris el mi “profesian esperantiston”. Unuafoje, laŭ konsilego de V. Sibircev, Novosibirska esperantisto, kiu gastis en Rostovo, en 1974 mi decidis gustumi SEJTon. Ĝis tiam mi kuirigis nur en la “marĉa seneventeco” de nia apenaŭ vegetanta urba klubo. Kaj – jen la tendaro. Min frapis ĉio: la homoj, la programo, la etoso...

Knabo kun “diablotoj en la okuloj” kaj belaj perspektivoj en la movado, kiel karese kaj iom profete priskribis min nia veterano A. Rogov, allogis atenton de V. Aroloviĉ, “eterna aktivulo kaj fidelulo” de E-o. Viktoro ekzorgis pri mia kariero en SEJM. Ĝi evoluis de estrarano ĝis la prezidanto kaj instruis min pri multo aldone al E-o. Kiel movada funkciulo mi ja devis kontakti kun pluraj burokratoj kaj tiel kompari ties vortojn kaj farojn, kiuj, ve, ne ĉiam koincidis. Dank' al E-o mi eksciadis pri aferoj prisilentataj en nia Patrujo kaj eĉ la unuan legaĵon pri sekso mi ricevis en la formo de la E-a “ABZ de amo”. Ankaŭ la malpermesitan Sovetie “Bestan farmon” de Orwell, kompreneble en nia kara lingvo, mi kaŝe ricevis pere de la ĉeĥa esperantisto I. Železny (dankon al li). E-o ne faris el mi aktivan disidenton, sed instruis multon pri la mondo preter la filtriloj de la reĝimo.

Intertempe mia movada ardo kaj agemo kondukis min al loka gazetaro. Mi ĝis nun memoras la unuan viziton al la ĉefa urba tagĵurnalo, kien mi alportis mallongan informon pri E-evento, iam en la fruaj 1970-aj aŭ fine de la 1960-aj. En la redakcio oni renkontis min afable, sed diris rekte: “Estis tempo, kiam ni multe informis pri E-o kaj ricevis baton sur la kapon”. Tamen, tempoj ŝanĝiĝas – eble, venis novaj instrukcioj”. La nova starpunkto ja aperis: “pri E-o eblas, sed ne tro”. (Por neinformitoj mi diru, ke siatempe ekzistis specia cirkulero de Gaviit/ĉefcenzurejo de USSR: “pri E-o aŭ malbone aŭ neniel”).

Pro tio en la plej gravaj t.n. centraj periodaĵoj la vorto Esperanto estis tabuo. Surloke, ĉefe pro nescio de superabundaj instrukcioj, E-o estis pli akceptebla.) Ekde tiam mi fariĝis “neetata raportanto” de pluraj lokaj periodaĵoj kaj estis eĉ sojle de profesia laboro ĉi-kampe.

Tamen la homo projektas, dio direktas. Ĵurnalistiko restis nur mia hobia. Entute mi publikigis centon da artikoloj, ĉefe ligitajn kun E-o, kaj en 1997 aperis mia ruslingva 159-paĝa libro “Portreto de ideo kun malordinaruloj anstataŭ la fono, aŭ la lingvo de doktoro Esperanta”.

En 1988 unuafoje en la historio de la postmilita Sovetio malfermiĝis “pordego al Okcidento”. Se en 1980 post ĉ. 2-monata baraktado por partopreni IJKon en Rauma mi ricevis ekstreman respondon de lokaj aŭtoritatoj: “Ni ne havas ion kontraŭ vi, sed vi ne veturos”, en 1988 kiu ajn ekrajtis direkti sin kien ajn. Do, ricevinte invitilon de Mila v.d. Horst-Kolinska, la “patrino de Mazi” kaj tiam ĉefmetodikistino de la Internacia Esperanto-Instituto, mi ekveturis al Nederlando, cetere, por partopreni ILEI-konferencon en Kerkrade, kie mi kontribuis al la programo per prelego “Kiel instrui tediaĵojn distre”. Mia prezento estis tiom sukcesa, ke ekde tiam mi estis invitata plu kaj plu. Instruado kadre de la Somera Akademio en Luksemburgo kaj en Barlastono, prelegvojaĝo en Germanio, prelegoj kaj seminarioj ĉe la Somera Universitato Aŭstralio, Paroligaj Kursoj en la Bergena UK, partopreno en la projekto “Indiĝenaj dialogoj”, kuninstruado en NASK (Usono)... Ĝis hodiaŭ dank’ al E-o mi vizitis dudekon da landoj de 4 kontinentoj.

Sed E-o ne vivas en “alia mondo”. La historio de la movado absolute dependas de la ĝenerala historio. Se temas pri Rusio, perestrojko transformiĝis en... katastrofkon. Labori kiel salajrata prezidanto de E-klubo fariĝis absolute neeble. Homoj ne havis monon ne nur por studi lingvon aŭ kulturumi - ili devis zorgi pri tio, kiel ne morti... Do, necesis serĉi alian oficon.

En 1990 mi efektivigis mian revon kaj defendis (en 1990) doktoran disertacion pri interlingvistiko. Mia scienca intereso pri E-o daŭre flamis kaj mi decidis verki habilitacian disertaĵon pri tio, kial kaj kiel eblas produkti, konservi kaj transdoni kulturon en E-o (lingvokulturologia problemo, pri kiu ankoraŭ neniu en la mondo disertis). Post pristudo de ĉ. 10 mil Esperantaj paĝoj mi verkis 631-paĝan libron, en kiu



Esperanto estas  
la lingvo  
por  
ni!

Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

detale priskribis la ligojn “E-kulturo – E-lingvo”. Aperis plia problemo: kie defendi la disertacion, ja la ĝenerala sinteno de la “granda lingvistiko” al la “malgranda interlingvistiko” ne estas la plej favora, aparte en Rusio. Kaj dank’ al kio venis la solvo? Kompreneble, dank’ al E-o.

En 2003 rekomende de Aleksandro Blinov, la animo de la E-movado en Ĉuvaŝio, mi estis invitita kiel honora gasto al la Lingva Festivalo, kiun regule organizas lokaj esperantistoj en la ĉefurbo de ties respubliko – Ĉeboksary. Dum vizito al la loka universitato min renkontis unu el la partoprenintoj de “Indiĝenaj dialogoj” – la nuna vicdekanino de la Ĉuvaŝa universitato Katja Afanasjeva. Ŝi konatigis min kun la ĉefo de la disertacia konsilantaro de la universitato, kiu absolute neatendite por mi proponis defendi la disertacion ĉe ili. Kaj decembre de 2004 mi ja sukcese faris tion. La nova esplordirekto ekŝajnis al la ĉuvaŝaj sciencistoj ege interesa kaj en 2006 ili petis min organizi interlingvistikan sekcion kadre de siaj ĉiujaraj konferencoj, kion mi volonte akceptis kaj prizorgas nun

(cetere, ege bonvenus ĉiunacian kontribuantojn ĉe se nur perkontribundaj!).

Kion diri krome? Ke mi „produktis“ denaskulinon Helena, kiu partoprenis plurajn E-aranĝojn Rusie kaj IJKon Strasburge, gajnis premiojn en E-poeziaj konkursoj „Liro“ kaj „Belartaj Konkursoj“, verkas kaj plenumas E-kantojn kaj instruas nian lingvon? Ke mi dankas E-on pro miaj E-amikecoj, kiuj renkontigis min kun homoj iusence el alia universo: pli bona, honesta, justa, kreema, helpema ktp.? Ke Esperanto edukis min tia, kia mi nun estas kaj ne hontas tion? Ke ĝi difinis mian sciencajn karieron kaj savis min en pluraj malfacilaj periodoj de l’ vivo? Ke mi ne imagas mian vivon sen Esperanto? Jes, mi devas diri ĉion ĉi por esti sincera.

Kaj kio pri VELK? Tiun siglon de Veterana Esperantlingva Klubo proponis iu ŝerculo alternative al VEK. Al li mi respondu: “Ne hodiaŭ, mi dankas vin!” ☺. Mi preferas resti ne inter “velkuloj” sed inter “vekuloj” – kaj vek, vek, vek!

Publikigitaj ĉi –foje diversĝenraj verkoj de aŭtoroj el diversaj landoj portas vere lirikan humoron. Legu kaj ĝuu!

franca kanzono  
en traduko de **Martin Ginette** [Soulxures/Moselotte, Francio]

**Raja Kudrjavceva** [Jekaterinburg, Rusio]

## Ĉe l' bordo de l' rivero

Ĉe l'bordo de l' rivero  
Dum la promenad'  
akvo estis kla-a-ra  
malpeza la vent'

Mi ekkuŝis en la herbon  
por aŭskulti venton  
kaj aŭskulti kanti  
la kamp-herbon

Ĉe l'bordo de l' rivero  
Mi endormiĝis  
revante pri te-e-ro  
kaj paradizo.

Ĉe bordo de l' rivero  
la ĉiel-birdoj  
kantas sian pre-e-ĝon  
al Dio la Sun'

## Versaĵeto en prozo

Ni ne vidis unu la alian kelkajn jarojn. Dum tiu tempo kun ni io okazis, io ŝanĝiĝis.

Ni renkontiĝis, ekpaŝis kune, sed mi ne povis diri al vi eĉ unu vorton. Ankaŭ vi silentis. Silente vi kliniĝis, deŝiris folieton kaj tuŝis per ĝi mian manon. La mano eksentis malvarmon. Mi streĉiĝis... Kaj vi ridetis kaj tuŝis mian manon per alia flanko de la folieto.

— Kaj nun?

Mola varmo trankviligis min.

— Kio ĝi estas? – mi demandis flustre.

— Tutilago. (\*)

— Kaj ĉu ĝi floras?

— Ĝi jam finfloris...

\* Tutilago – herba kreskaĵo, kies folioj estas de unu flanko molaj kaj agrablaj, de la alia - krudaj kaj pikaj.

## Ĉu vi vidas sunon?

Jekaterina Reznikova. Tradukis **Rinat Hismatullin**. [Niĵnekamsk, Rusio]

Ĉu vi vidas sunon? Ne? Strange... Mi vidas... Nu, kion vi? Rigardu, ja jen ĝi estas! Ĉu nun estas nokto? Nu, kio do? Suno ekzistas ĉiam, vi nur rigardu atente... Ĝi estas hela, varma, ĝi brilas. Vi al mi ne kredas? Ĉu vi volas, ke mi instruu vin? Fermu la okulojn... Etendu la brakojn supren... Ĉu nun vi sentas, ke ĝi tuŝas viajn fingrojn? Ĉu sentas vi??? Kaj nun – malfermu la okulojn... Nu, kiel? Ĉu vi vidas ĝin? Hodiaŭ la sunradioj estas rute neordinaraj, ili estas hele-bluj.

Ĉu vi vidas la sunon? Ne? Sed mi vidas... Rigardu atente, ĝi ja estas ĉi tie, kune kun vi! Nu, kio do, ke nun estas fulmotondro kaj pluvos? Fermu la okulojn... Ĉu vi sentas, kiel ĝi glitas per siaj radioj laŭ via vizaĝo? Ĉu sentas vi? Hodiaŭ ĝi venis al vi kaj restos kun vi por ĉiam. Ĉu vi kredas?

Ĉu vi vidas sunon? Vidas? Strange... Sed mi – NE.



Mihail Zaharov

Esperantigis Andrej Naumov.  
[Novoaltajsk, Rusio]

## Laŭ ĉielo boato naĝis

Kiam vespere trankviliĝos la vento kaj eklumos la unuaj steloj, ne fore de la tendo sub la arbo mi faros lignofajron.

Kaj dume mi okupiĝas pri lignaĵoj, al mi ŝajnas, ke el la mallumo iu rigardas al mi malaprobe, ĉar nekonvene laŭte mi batas per hakilo. Kaj tiu "iu" estas Silento. Akompane de tiu ĉi rigardo, klopodante ne brui, kun stoketo de lignaĵoj enmane mispaŝante en densa herbo, mi proksimiĝas al la tendo.

La nokto momente ĉirkaŭas la flamon. Tien-reen puŝante unu la alian ludas lumo kaj mallumo. Se la flamo ekbrilas – mallumo flankiĝas, montrante tiam la arbuston de ribo kaj mian kruĉon kun teo. Se la fajro kaŝiĝas – la mallumo forlekas kaj la riban arbuston, kaj la kruĉon kun teo. Se la lignokarbo pafas en la ĉielon per fajreroj – kaj la mallumo fulme saltas kvazaŭ fluganta muso.

Super la kapo, en la arbaj branĉoj, ekĉirpetas nevidebla birdeto kaj faligas en la kruĉon guteton de roso. Kaj denove silentas kaj nur aŭdeblas, kiel ie zumas kulo.

Io proksimiĝas al mia fajro, susurante en la herbo, pli kaj pli proksime. Ah, Dio mia, erinaco al mi venas, malgranda, ronda erinaco! Ĝi timeme eksidas apud la lignofajro, kaj nun ni duope rigardas, kiel moviĝas la flamo kaj pafas la lignoj; post ĉiu pafado la

erinaco ektremas kaj demandante rigardas al mi.

— Tio estas lignofajro, ĝi ankaŭ estas vivanta — estu kun ni, ne timu. — Kaj la erinaceto, ŝajnas, ne timas, malgraŭ ke vidas nin por la unua fojo.

Ĉe la nordo ĉielo ĝis nun havas pale-verdan koloron, kaj tie, ĉe la horizonto, aperas granda, blue-verda nuboj. Kiam ni ordigas la lignaĵojn en la fajro mi rigardas al tiu ĉi nuboj. Ĝi vivas, ŝanĝas sian formon, etendiĝas. Kaj jen, se atente rigardi, tio jam ne estas nuboj, sed laŭ la ĉielo naĝas grandega boato kun perlumanta fundo. En la boato sidas fiŝkaptisto, en ĉapo kaj kun barbo. Jen li malrapide kliniĝas, iomete levas la brakon, kiu estas ĉe li nur unusola, kaj videblas, kiel li kontrolas la fiŝreton. Lia reto estas plenplena per la verdaj karasoj, kies skvamoj brilas kvazaŭ steletoj.

Jen la fiŝkaptisto iom movas la remilon kaj sur la ĉielo ekaŝas denseblua ondo. Ĉe la oriento ĝi atingas stelaron de *Skorpio* kaj preskaŭ kovras ĝin.

Ĉe la nordo ĝi tuŝetas la *Grandan Ursinon* kaj balancigas la *Ĉerpilon*.

Tiam la *Ĉerpilo* kliniĝas kaj el ĝi elŝutiĝas kaj falas sur la teron plena manplato de roso.

La ondo atingas ankaŭ min. Tuŝas la vangon per sia humida malvarmo, mallaŭte susuras per la herbo kaj sensone metas sur la ŝultron malsekan arban folion. En la lumo de la fajro pormomente aperas strigo, laŭte krias kaj malaperas en la nebulajn kampetojn.

Jam delonge foriris la erinaco. Estingiĝis mia fajro. Delonge fornaĝis la ĉiela boato, kaj kvazaŭ spuroj de ĝi videblas sur malluma ĉielsfero la *Lakta Vojo*, ĝi videblas nun jam per aŭtune helaj steloj.

Morgaŭ okazos granda festo. Tiel nomata *Tago de Jlija - komenco de grandaj rosoj*, kaj kune kun abunda roso venos atendata momento de Meznoktaj Misteroj. Tiam okazos ŝanĝo de somero kaj aŭtuno. Sed se mi estos eĉ tre atenta, mi tion ne rimarkos.



*Karaj legantoj!*

*Ĉi tie vi vidas unuan provon  
verki teatraĵon por tiu ĉi rubriko.  
Aŭtorino estas tre konata al vi Santi  
Elena Bullo el Italio, kiu verkas es-  
perante en diversaj formoj kaj ni  
multfoje publikigis en "K" ŝiajn ra-  
kontojn, novelojn, poemojn, bildojn.*

**Santi Elena Bullo**

[Mestre, Italio]

**Personoj:****Johano Renan**, studento**Paŭlo Leveieur**, lia amiko, stu-  
dento**Tina**, fratino de Paŭlo, studen-  
tino**Delia Maille**, amikino de Tina,  
studentino**Instrukcioj**

La ago disvolviĝas en malgranda parko, apud la rivero. La personoj estas junaj, kaj ili estas vestitaj en kutimajn promenajn vestojn. Tasko de la reĝisoro estas bone direktigi la agon kaj enŝovi se li volas, fonbruojn aŭ fonmuzikojn. La vortoj "dekstre", "maldekstre", estas uzitaj rilate al spektantaro.

**Scenejo**

Ĉio okazas en malgranda parko apud Sejno. Kiel bordo de natura teraso, estas parapeto kun floraj potoj. Sur la placeto antaŭ la parapeto estas du benkoj kaj ŝtona tableto. Flanke estas grandaj ŝtonaj vazoj kun verdaj plantoj. Dekstre kaj maldekstre, arbetoj aŭ arboj, floroj, folioj. Malgranda baseno maldekstre, apud la parapeto. Padoj, dekstre kaj maldekstre, strekiĝas ĝis la placeto, antaŭ la parapeto. Kaŝitaj inter la arboj lampoj.

Prezentado en unu akto.

# Apud la Sejno

SCENO I

Johano

(Li eniras kaj metas sur la tableton sian sakon)

**Johano** – Kian pacon tiu ĉi loko al mi donas. .. (rigardas la base-  
non). En la friska akvo, trankvile naĝas fiŝoj, nesupozantaj  
pri tio, kion la ŝanco portos al ili morgaŭ ... (rigardas inter  
la arboj). La birdoj kantas... jen ili forflugas al la lazura  
ĉielo...(li frapetas la parapeton). La ŝipoj navigas en la  
granda rivero... Mi povus ilin rigardi dum longa tempo...  
(revenas al la tableto, montras la sakon). Mia pakajo...  
plumo, kraĵoj, libroj, kajeroj... Tio estas la tuta mia doto!

SCENO II

Johano, Paŭlo

(Paŭlo eniras de maldekstre)

**Paŭlo** – Bonan tagon, aŭ bonan vesperon, kiel vi preferas!**Johano** – (afable) – Bonan vesperon... Kio venigis vin ĉi tien?**Paŭlo** – Mi ne plu vidis vin post la lingva leciono, kaj mi pensis, ke  
eble mi trovos vin ĉi tie...**Johano** – Vere, vi pravas... Mi tre ŝatas tiun misteran lokon.**Paŭlo** – (ridetas) Certe, tiu ĉi duonparko, duongardeno estas in-  
teresa loko... sed mistera ĝi al mi ne ŝajnas...**Johano** – Vi povas ĉi tie sekvi per la rigardo la ŝipojn. Vi ne scias,  
kien ili iras...**Paŭlo** – Min ne allogas tio... Mi preferas aliajn amuzaĵojn... Sed ni  
ŝanĝu la temon... Ĉu vi hieraŭ vespere spektis la futbalmat-  
ĉon inter Anglio kaj Francio?**Johano** – Ne, mi ludis per komputero...**Paŭlo** – Mi bedaŭras! Estis tre interesa matĉo, vera sporta batalo...  
La gazetoj multe raportis pri tio...**Johano** – Bone.**Paŭlo** – Sed mi sentas, ke vi kvazaŭ ŝatus ion kaŝi de mi?**Johano** – Pri kio vi parolas?**Paŭlo** – Sentebblas, ke estas io, kio multe ĝenas vin. (rigardas la  
amikon) Eble vi enamiĝis?**Johano** (konfuzite) – Eble.**Paŭlo** – Ni iru promeni dum mi atendas mian fratinnon Tina, kiun mi  
akompanos ĝis la lernejo.... Laŭ voje vi povus ĉion rakonti  
(Johano prenas sian sakon kaj ili eliras dekstren, dum du ju-  
nulinon, Tina kaj Delia eniras la scenejon de maldekstre).



SCENO III

Tina, Delia

**Tina** -- Kiom al mi plaĉas tiu ĉi placeto!  
Mi ŝatas rigardi la ŝipojn, kiuj malrapide navigas sur la akvo... Dum vi ĝue observas, akvo en la rivero ŝanĝas la koloron, kaj jen ĝi jam estas alia... Bedaŭrinde, hodiaŭ estas malmulte da spektantoj... Sed ial vi estas hodiaŭ malgaja kaj malbonhumora?

**Delia** – Kial vi tion diras?

**Tina** — Ĉiufoje vi volonte interparolas kun mi... Hodiaŭ vi, male, estas tre silentema... Estas io, kio vin ĝenas...

**Delia** – Vere, vi pravas...

**Tina** (ridetas) - Ĉu li estas bela knabo?

**Delia** – Verŝajne...

**Tina** (scivoleme) – Kie vi renkontiĝis?

**Delia** – En la fronta ĝardeno... Mi estis kun geamikoj... Ankaŭ li estis kun sia kompanio... La komunaj amikoj interparolis, poste ni ĉiuj disiris laŭ siaj direktoj... Plu ni ne renkontiĝis...

SCENO IV

Ĉeestantoj, Paŭlo, Johano  
(junuloj aperas de maldekstre)

**Paŭlo** — Bonan vesperon! Kiel vi vidas, fratineto, mi estas ĉiam preta akompani vin al via leciono de gimnastiko!

**Tina** – Mil dankoj! Mi estas kun mia amikino Delia, kiun vi verŝajne jam konas...

(dum ŝi parolis, Delia kaj Johano jam renkontiĝas per rigardoj, ekkonas unu la alian).

**Paŭlo** – Sed ni devas iri...

**Johano** (proksimiĝante al Delia) – Mi devas konfesi, ke la fortuno favoras al mi ĉi foje kaj mi kaptas la okazon por demandi, kie vi loĝas?

**Delia** – Najbare al la domo de la gefratoj Levieur...

**Johano** – Sed kial ni tiam ne renkontiĝis antaŭe?

**Delia** – Eble pro malsamaj horaroj de la lecionoj en la lernejo...

**Johano** – (kore) Mi ĉiam pensis pri vi post nia iama hazadra renkonto.

**Delia** (ridetas) – Vi estas vigla revanto. Sed ni apenaŭ konas unu la alian...


**Johano** – Evidente ni havas ŝancon konatiĝi kaj eble eĉ amikiĝi. (Foriras kune.)

**Fino de la akto**



Ni daŭrigas publikadon de gramatikaj lecionoj de J-L Tortel.

## Gramatika leciono № 13



*Saluton, geamikoj!*

Ni certe konsentas, ke oni devas trafi bonan okazon, ĉar la posta eble estos ne tiel bona. Zamenhof tiel proverb-igis tion:

**Al vi ne plaĉis sitelo, laboru per martelo** (65) (ni ne akceptis ion; nun ni devas akcepti alian aferon malpli agrablan).

La verba fino en **-is** indikas, ke la ago aŭ stato okazis antaŭe, jam finiĝis. Gramatikistoj nomas tion pasinta tempo, aŭ paseo, aŭ preterito. La unua estas prefer-inda, ĉar pli klara. Ĝi prezentas ĉiujn momentojn de la pasinta afero. Sed la pasinta tempo estas tre longa, kun pasinta tempo en la pasinta tempo! Ekzemple hieraŭ kaj antaŭhieraŭ estas pasintaj, sed antaŭhieraŭ estas pasinta rilate al hieraŭ! Tial kelkaj lingvoj havas plurajn pasintajn tempojn por indiki tion. Esperanto ne havas plurajn. Tamen ĝi proponas nuancojn en la pasinta tempo: unu nuancon per aldonaj vortoj, kaj alian per **-ad**. Jen 3 ekzemploj el **La Fundamento**, § 24:

*Hieraŭ li diris al mi la veron:* simpla pasinta tempo en preciza tempo

*Li ĉiam diradis al mi la veron:* **-ad** indikas daŭron kaj ripeton en la pasinta tempo = li ripete, senescepte de-nove, re-diras la veron.

*Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron.*

diris okazis antaŭ vidis; la al-donaj vortoj jam antaŭe indikas tion. Ni bone memoru tiujn tri ekzemplojn; ili resumas preskaŭ ĉion, kion ni devas scii pri pasinta tempo.

Ni ankaŭ povas uzi kunmetajn formojn (li estis dirinta) kiujn ni vidos alian fojon.

**Plaĉi** = vekti senton de plezuro aŭ simpatian inklinon (PIV). Ekzemple ankoraŭ en Proverbaro :

**Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto** (16).

Esperanto havas du aliajn proksimajn vortojn:

**Ŝatu amikon laŭ la dato de akiro** (2379)

Ŝati = rigardi valoran. Kaj:

**Amu Antonon, sed gardu vian monon** (89)

Tiu proverbo ne bezonas klarigon, ĉu ne?

Ami ĉefe signifas havi koran inklinon al iu aŭ al io.

**Amu domon novan kaj amikon malnovan** (90)

bone montras la du sencojn de **am-**: oni ne simile amas domon kaj homon! Hodiaŭ oni dirus: Ŝatu domon kaj amu amikon. Same uzebla estas ami ankaŭ por sekse ami:

*Ŝi amis volupte la filojn de Asirio* (Biblio, Jekhezkel, 23, 12)  
Nun oni preferas uzi en tia kazo **amori kun**.

**Aperas prudento, kiam pasis la momento** (113):

Unu el la mal-faciloj de la uz-ado de lingvoj kuŝas en tio, ke la senco de similaj vortoj ĉiam iom diferencas en tiuj mal-samaj lingvoj. Ni jam vidis tion en nia 9a babilado, pri facila vento de La Espero. Ni do povas erari se nia etna vorto kvazaŭ similas al la esperanta. Prudento ne estas singardemo, kiel en kelkaj lingvoj, sed kapablo juĝi, inteligenteco; momento estas tre mallonga tempo, kvazaŭ sekundo, kaj ne tempo longeta, kiel en kelkaj lingvoj. Ni kontrolu en PIV se ni dubas - kaj eĉ se ni estas tro certaj !

**Kiam, ki-am:** *ki* en-kondukas demandon, **-am** indikas tempon; *do: kiam = en kiu tempo?*

**Ŝteli ĉe ŝtel-isto estas malfacile** (2391)

**-ist** indikas :

- profesi-ulon: juro, juristo ; dento, dentisto.
- pasian amatoron: kolekti, kolektisto; ĉasi, ĉasisto
- anon, adepton: esperantisto, budhisto

**Ĉe** havas du sencojn:

- spacan = tre proksime, hejme de, kiel ĉi-supre:

**Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo** (213)

- tempan = tiam, okaze de, momente de:

**Ĉe piej granda fido memoru pri perfido** (217)

Ĉe estas en la dua kazo sinonimo (sam-senca vorto) de je, kiun ni vidis en la 10-a babilado.

“Ni ne dubis je la estonteco (estonteco = venonta tempo) de nia afero”, - skribis Zamenhof en 1882 en *La Esperantisto*, la unua gazeto en Esperanto, kiun li redaktadis. Ni same ne dubu je (aŭ pri) la estonteco de nia inter-babilado ! Do, ĝis !

*Johan-Luko*

Aleksandr Melnikov  
[Rostov-Don, Rusio]

*Espereble konatiĝo kun la fragmento de la prilingva eseo de nia ĉi-numera gasto doktoro A.S. Melnikov instigos vin akiri lian lastaperintan interesegan libron kaj tralegi ĝin plene.*

## Ekparolu por ke mi vin vidu, aŭ Ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj

(eseo pri la lingva personeco de “tipa esperantisto”) el la libro de A.Melnikov  
“Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco”



La fama rusa sciencisto G.O. Vinokur foje diris, ke vorto estas ago. Kiel li pravis! Ja, same kiel oni povas juĝi pri homo laŭ ties faroj, oni rajtas fari portreton ankaŭ laŭ ties vortoj. (pli ĝuste – parolspecifajoj). Tial aperis tuta branĉo, kiu esploras *lingvajn personecojn*. Se frazi primitive, la ideo estas, ke ĉiu personeco enhavas siajn lingvan kaj ĉirkaŭ lingvan ingrediencojn, kiuj difinas, *kiel la persono mem parolas kaj kiel li komprenas tion, kion diras oni*.

Doktuloj asertas, ke gravan lokon en la difino de lingva personeco okupas ties *konceptaro*, reflektiĝanta en la lingvo malrekte: 1) per (ne)nomado de certaj vivsituaĵoj, faktoj kaj fenomenoj kun kaŝita por neinicitoj pritakso de ilia (ne)graveco (mal)pozitiveco, (ne)tip-eco; 2) pere de kutimaj formoj de komparoj (kiuj konkrete faktoj, fenomenoj kaj situacioj aŭ “scenaroj” de la eksterlingva realaĵo servas kiel modelo, kompara etalono); 3) per hierarkiigo de la fenomenoj/faktoj laŭ ties graveco, kiu respeguliĝas vorte nur kiel *implicaĵo*, k.a. ...

...La unuan punkton mi... ilustris per la pure kaj nure esperanta vorto *krokodilo* (en ties movada signifo). En kiu alia lingvo ĝi havas nian signifon: *fiulo* ©, kiu parolas nacilingve inter esperantistoj?! En neniu alia lingvo oni inventus apartan “etikendon” por tio, ĉar la rilata fenomeno mem estas absolute sensignifa en ajna kulturo. Krom la nia! Ja, kiel ironiis nia bardo sen barbo (tiel nomis sin

mem G. Handzlik) “*Multajn Esperanto-klubojn oni povus nomi ‘kluboj de bestamantoj’; kompreneble temas pri esperanta speco de krokodiloj*”. Krokodilo fariĝis temo de esperantistaj ŝercoj (vd. la ĉi-kunajn desegnaĵojn) kaj, same kiel en ajna etna lingvo, la vorto komencis du drivadojn: laŭ *senco kaj formo*. Aperis novformajoj *krokodilemo, malkrokodilado, krokodilito* © kaj multaj aliaj. Krokodilo nacilingvas. Kial? Eble pro nesufiĉa lingvoposedo. Do, evoluas kromsignifo *komencanto, nesperta Esperanto-parolanto*. Eble la homo eĉ tute ne parolas esperante – tiel la senco drivas ĝis *malsamideano* (denove en la pure kaj nure esperanta senco – *neesperantisto!*) Komparu: *Fakte, kiom da komencantoj (duonkrokodiloj, krokodiloj) oni rajtas venigi al tendaro kune kun 1, 2, 3, 5, 10, 25 aktivuloj-spertuloj*. [REGo: 2002, 3 (10), 11-12]; *orienti la TEJO-reprezentantojn en ties ambasadoraj taskoj tra la krokodila mondo*. [Esperanto: 1998, 7/8, 127]. Ankaŭ la formo ne restis sen evoluo. Pluraj ŝerculoj limigis la ĝeneralan *krokodilo* je ‘paroli inter esperantistoj en la gepatra lingvo’ aldoninte ‘*aligatori*’ (konversacii nek en Esperanto, nek en la denaska nacia lingvo) kaj *kajmani* (paroli en la lingvo, kiu ne estas denaska por ĉiuj komunikantoj). Pluraj ŝerculoj ĉi tie ne haltis (estas malfacile haltigi esperantistojn ©) kaj suplementis per *gaviali kaj saŭri*...

La samo validas pri *Fina Venko* (primitive parolante – tiu momento, kiam Esperanto estus ĝenerale akceptita kiel kutima rimedo de internacia komunikado); *Nova Sento* (= esperantismo, ideo pri interpopola frateco, diverslingvula egalrajteco, justeco k.s. en interetna komunikado sed ne nur); *Fundamento (de Esperanto)* – la netuŝebla “Biblio” de Esperanto verkita de L.Zamenhof; *atisto/atisto* (adepto de la respektiva afikso en la diskuto pri la Esperantaj partecipoj: “-

ata/-ita problemoj”); *Ĉe-metodo* (la iam furora kaj daŭre valora Esperanto-instruata metodo de A.Cseh); ... *eterna komencanto, ĝisostulo, entuziasmulo, denaskulo* (tipoj de esperantistoj) kaj multo alia grava (aŭ alisignifa) nur por (respektive – en) la Esperanto-kulturo...

... Kaj jen – specimenoj de realaj esperantistaj leter-finaĵoj, ĉerpitaj el Interreto: *Samideane* via (tre ofta formulo); *Kun finvenkisma saluto; Homarane* (de ‘homaranismo’); Bone kaj *kuraĝe antaŭen!*; *Mi salutas vin tutkore, Zamenhof-ideale*. Provu skribi tion al via samkulturano en via denaska lingvo (sed nenial malkaŝu, ke tion konsilis mi ©).

Lingva personeco de “tipa esperantisto” scipovas manipuli ankaŭ per specifaj nur por Esperanto flugilhavaj vortoj. Legu la aforismojn de Georgo Handzlik: *Antaŭ ol vi fosos vian sulkon, kontrolu, ĉu ĝi fakte estas la via. ‘Rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante!’ iu ekkriis, staranta rande de abismo. Nia diligenta kolegaro, post longa laboro, jam volas iom ripozi*. [La Gazeto: 2001, 92, 22]...

... Kiel plaĉas al vi, ekzemple, ĉi tiu komparo: [juna kelnerino] *staras senmove, rigardante min, buŝon larĝe malfermitan, same kiel lernanto antaŭ Plena Analiza Gramatiko*. [LKK: 1993, 68, 13]. Ĉu Esperanto-laikoj komprenus la sencon, ĉu ili aprecus la trafekon kaj humurecon de la diraĵo?


Ĉiuj traktitaj citaĵoj enhavis “esperantonimajn komparojn” (io el Eksteresperantio estis priskribata per “esperantiaj terminoj”)...

Fina venku...  
Hmmm... Mi vidu...  
2009... 2877...  
3706... Hmmm...



Sur la paĝo bildoj el la libro de A.S.Melnikov  
“Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco”

# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



El la germana esperantigis **Arina Osipova** [Jekaterinburg, Rusio]

## Vespere, post laboro

*Gastoĉambro. La edzo en hejmpantofloj sidas en brakseĝo kaj dormetas. Post li estas la pordo en la kuirejon, kie klopodas la edzino.*

Ŝi: Hermann...

Li: Jes...

Ŝi: Kion vi faras tie?

Li: Nenion...

Ŝi: Nenion? Ĉu vere nenion?

Li: Mi faras nenion...

Ŝi: Ĉu tute nenion?

Li: Ne...

### Paŭzo

Ŝi: Ĉu ĝenerale nenion?

Li: Ne... mi sidas ĉi tie...

Ŝi: Vi sidas tie, ĉu?

Li: Jes...

Ŝi: Sed tute gale vi ion faras...

Li: Nenion eksterordinaran...

Ŝi: Estus ne malbone, se vi iomete promenus...

Li: Ne, ne!

Ŝi: Mi alportos vian palton...

Li: Ne, dankon...

Ŝi: Sed ekstere estas malvarmege sen palto...

Li: Sed mi ja ne volas promeni...

Ŝi: Sed vi ja ankoraŭ volas...

Li: Ne, vi volas, ke mi promenu...

Ŝi: Mi? Por mi estas tute gale, ĉu promenos vi aŭ ne...

Li: Bone...

Ŝi: Mi nur opinias, ke vi povus promeni...

Li: Ne, mi ne volas...

Ŝi: Do, kion vi volas?

Li: Mi volus ĉi tie sidi...

Ŝi: Vi estas freneza...

Li: Oooh...

Ŝi: Dekomence vi volas promeni... poste jam vi ne volas... poste mi devas alporti vian palton... poste vi denove ne volas... kion sekvas poste?

Li: Mi volus ĉi tie sidi...

Ŝi: Hm... Tuj subite vi ekvolis ĉi tie sidi...

Li: Tute ne subite... Mi ĉiam volis ĉi tie sidi... kaj ripozi...

Ŝi: Se vi vere volus ripozi, ĉu komencus vi paroli kun mi...

Li: Mi nenion plu diros...

### Paŭzo

Ŝi: Se vi tuj havus tempon por fari ion plezure...

Li: Jes...

Ŝi: Kion vi legas?

Li: Nun nenion

Ŝi: Legu poste ion...

Li: Poste, poste...

Iam... verŝajne...

Ŝi: Rigardu ilustraĵojn...

Li: Dekomence mi volus simple ĉi tie sidi...

Ŝi: Ĉu mi devas al vi ilin alporti?

Li: Ne, ne! Grandan dankon...

Ŝi: Ĉu vi deziras, ke mi prservu vin?

Li: Ne, tute ne...

Ŝi: Mi vantkuras dum la tuta tago tien kaj reen... vi povus almenaŭ stari kaj preni libron...

Li: Mi ne deziras tuj legi...

Ŝi: Kial vi ne deziras?

Li: (silentas)

Ŝi: Hermann!

Li: (silentas)

Ŝi: Ĉu vi estas muta?

Li: Ne, ne...

Ŝi: Vi nenion faras, de kio povas ricevi plezuron... Vi sidas ĉi tie!

Li: Mi sidas ĉi tie plezurege...



Ŝi: Ne estu tia agresiva!

Li: Mi ja estas tute ne agresiva...

Ŝi: Ne krii! Kial vi krias?

Li: (krias) Mi tute ne krias...

Ŝi: Bone, se vi volas, vi povas ripozi. Mi ne malhelpos vin...



## El vivo de kuracistoj

— Sinjoro kuracisto, ĉu vi certas, ke mi resaniĝos? Mi aŭdis, ke foj-foje kuracistoj nekorekte diagnozas, ekzemple, ili kuracas pneŭmonion, sed homo mortas pro kancero.

— Similaj okazaĵoj estas ne el mia praktiko. Se mi kuracas iun kontraŭ pneŭmonio, tiu mortas ĝuste de pneŭmonio.

✱

Renkontiĝas du psikiatroj:

— Mi havas interesan pacienton. Li imagas, ke li estas aŭto.

— Kaj kiel vi lin kuracas?

— Kuracas! Mi per li la duan semajnon veturas al la laborejo.

✱

Kuracisto rekomendas al patrino de malsana infano:

— Li trinku sep kulerojn de tiu kuracilo, kaj ĉio bonordos.

— Tio neblas. Ni hejme havas nur ses kulerojn.

✱

Kuracisto al paciento:

— Ĉar vi venis al mi por la unua fojo, mi ŝatus, ke vi rakontu pri ĉio ekde la komenco.

Paciento:

— Jes, kompreneble. Do, dekomence la Dio kreis ĉielon kaj teron...

✱

Anonco sur la pordo de psikiatro:

“Sinturnu ĉi tien ĉiam, kiam vi havas malagrablaĵojn. Kontraŭ \$200 mi konsilos al vi, kiel liberigi de ili. Se vi ne havas malagrablaĵojn, mi pagos al vi \$500 por ekscii, kiel vi sukcesas vivi sen ili.”

En cirkon dungiĝas junulo.  
La direktoro interesiĝas:

— Kion vi volas prezenti en nia cirko?

— Mi havas bonegan prezentadon — mi elpaŝos kiel homo-giganto.

— Sed, pardonu, kun via malgranda alteco...

— Ne gravas, mi prezentos min kiel la plej malgranda giganto en la mondo.

\*

Estas unua leciono en la unua klaso. Instruistino demandas la infanojn, al kiuj el siaj parencoj ili similas.

— Mi havas nazon de la patro kaj okulojn de la patrino, — diras unu knabo.

— Kaj mi havas fruntan de la avo, kaj la orelojn de mia onklo, — diras la dua.

— Kaj mi havas pantalonon de mia frato, — diras la tria.

*Harry Potter* estas fama pro tio, ke sciopovas trovi eliron el plej malfacilaj situacioj.

Sed li eĉ pli famas pro tio, ke scias trovi tien eniron...

\*

Venas viro al restoracio.

— Mi hieraŭ ĉi tie vespermanĝis?

— Jes.

— Kaj \$10000 ĉi tie fordrinkis?

— Jes.

— Uf-f! Sed mi ektimis, ke mi perdis ilin...

\*

Edzino al la edzo:

— Kie vi estis?

— Kun hundo promenis.

— Sed ni ja ne havas hundon.

— Ni sur strato konatiĝis...



Všivceva Galina  
[Miass, Rusio]

*En nia rubriko ni volonte prezentas al vi la movadon, kiu sukcese aplikas Esperanton por siaj noblaj celoj plibonigi la mondon, familiajn kaj sociajn rilatojn de homoj, fortigi fratecon kaj amikecon.*

# Movado sen nomo

## Celo:

**Movado sen nomo** estas vigla kaj originala movado kiu volas starigi pli bonajn interhomajn kontaktojn.

Ĝi pledas en tiu ĉi materiisma mondo por "la kulturo de la koro".


Pere de plikulturado de la koro, ĝi volas reaperigi fratecon, bonecon, amikecon en la medioj, kie ofte tiuj valoroj forestas pro nura egoismo, pro la "mi"-kulturo.

Ĝi alvokas al nova vivstilo kaj humanigo de homo kaj socio.

**Agado.** En sia agado MNS uzas diversajn agadformojn:

### a) Levilkartoj

Kvar foje jare aperas sloganoj kun mallonga, konciza klarigo, kiun oni pendigu en bone videbla loko. - ili alportas "homecan mesaĝon" kiu alvokas al nova vivstilo - ili inspiru homojn trans ĉiuj politikaj, ideologiaj kaj religiaj tendencoj. Ili estas tute senpage sendataj! Sube vi povas vidi, kiel la slogano aspektas. La tekston de la dorsa flanko de levilkarto vi trovos sur la najbara paĝo.



### b) libroj

La verkaro de *Phil Bosmans* (iniciatinto de la nederlanda organizo *Bond zonder Naam*, en kies sino kreiĝis Movado sen Nomo) rakontas kion **MsN** celas (per la kulturo de la koro). La unua kaj la plej ofte legata libro estas **Ŝanco por feliĉo**. Ĝi enhavas "vitaminojn por la koro", liveras ideojn, sugestas kaj inspiras pri la kulturo de la koro. En 2000 aperis dua libro **Donace al vi**, ankaŭ kun belaj, kuraĝigaj kaj pensigaj tekstoj.

### c) helpo al homoj en mizero

Ĉar MsN interesiĝas pri la tuta homo, ĝi ne nur volas trovi solvon por la manko de bonaj pensoj, sed ĝi ankaŭ zorgas pri la "materia bezono" por minimuma vivsekuro de plej malriĉaj kaj forgesitaj homoj.

## Historio de la MOVADO SEN NOMO

Asocio kun la nomo "Bond zonder Naam" (Movado sen Nomo) estis fondita en Nederlando, far de pastro *Henri De Greef*, en 1938. Poste, en 1957 alia pastro *Phil Bosmans*, ricevis la taskon — fondi asocion "Bond zonder Naam" en Belgio kaj li sukcesis altiri al la ideo 20.000 interesitojn.

Lia baza ideo estis, ke en la moderna socio, oni donas tro multe da atento por tekniko kaj teknologio kaj emas forgesi la simplajn homajn bezonojn. Tial li emfazis la "Kulturon de la Koro". Li i.a. atentigis la publikon per la presado kaj dissendado de kartoj, kiuj havi(a)s simplan trafan mesaĝon. Li nomis ilin **levilkartoj**, ĉar uzis ilin por levi la homan nivelon en la socio. Foje la slogano sur tiu karto estis milda, humurplena, foje ĝi estis akra.

La strukturo de la movado estas tute volontula — membreco estas senpaga.

Sed la aliĝintoj promesas atenti pri la Kulturo de la Koro. Mirige estas ke (sen almozpeti!) spontanaj donacoj ĉiam sufiĉis por kovri la pres- administrad- kaj afrankokostojn. La movado rapide kreskis al 300.000 membroj.

*Phil Bosmans* rimarkis ke tiu bezono je Kulturo de la Koro estas universala. Lia agado komenciĝis en Flandrio kaj do en la nederlanda lingvo. Sed *Bosmans* instigis kaj subtenis similajn iniciatojn en la franc-lingva parto de Belgio kaj eksterlande. Tiel fondiĝis 11 pliaj asocioj, kiuj estis aŭtonomaj.

*Bosmans* simpatiis al Esperanto kaj komprenis ke ĝi havas eblecojn por plivastigi la horizonton por la mesaĝoj pri la Kulturo de la Koro.

En 1980, nova esperantisto, *Jos Kerfs*, ekkontaktis kun *Bosmans*. Kune kun du amikoj kaj kelkaj spertaj esperantistoj en Antwerpen, li fondis la 12an sekcion: **Movado sen Nomo**. Eldoniĝis 6 levilkartoj en la jaro. La bazaj principoj restis samaj: senpaga membreco, sed la membroj promesas atenti pri la Kulturo de la Koro kaj eventuale finance kontribuas laŭ siaj deziro kaj ebleco. La unua slogano, kiu ankaŭ respegulas la esencon de la movado, estis "Pli bona mondo komenciĝas en via propra Koro".

Ekde la komenco, la agado estis en harmonio kun **Bond zonder Naam**, sed tute sendependa.

Ekde la komenco ekzistis ankaŭ la problemo, kiu estis en malfido de esperantistoj, lige kun "senpaga aliĝo". Oni dubis, sed iom post iom, membronombro kreskis. En 1988 **Movado sen Nomo** unuafoje aperis en la Universala Kongreso en Rotterdam... Grava paŝo estis la eldono de traduko de la plej furora libro de *Phil Bosmans* **Ŝanco por Feliĉo**. Esperanto estis la 20a lingvo en kiu ĝi eldoniĝis.

La nombro da aliĝintoj al MSN kreskis al 1800 en 65 landoj. Ĉiujare alvenas multaj korespondaĵoj de personoj, kiuj esprimas sian admiron kaj aprezon por la senditaj **levilkartoj**.

MSN ankaŭ havigas eblecon por rete kontribui aŭ diskuti: <http://m-s-n.skynetblogs.be>. Ne forgesu uzi ĉi tiun eblecon.

### Sloganoj:

Jam dum pli ol 25 jaroj, Movado sen Nomo dissendas siajn mesaĝojn tra la mondo. La sloganojn ĉiam akompanas inspira teksto por pli profunde lumigi la sencon de la slogano.

La sloganoj ekzistas en papera kaj elektronika formo. Kiam vi aliĝas, bonvolu mencii kiamaniere vi deziras ricevi la sloganojn. Jen la plej bonaj el la pasintaj jaroj:

- Ali-pensantoj... ankaŭ pensas.
- Hejmo estas pli ol nura konstruaĵo.
- Spaco por paco.
- Egoistoj ne renkontiĝas, ili kolizias.
- Optimistoj vivas pli longe.
- Pardonon estas la plej bela dono.
- Kontenta homo estas anĝelo en la domo.
- Urĝe malhastu!
- Ne estu nur papilio en via familio!
- Malbona vetero ne estas bariero.
- Silento estas evento.
- Homo valoras pli ol mono.
- Bonfar(t)i = bonfartigi aliajn.
- Ĉevalpovo de aŭto ne helpas se azeno stiras ĝin.

### Membreco:

Ĉiuj homoj kiuj interesiĝas pri pli bona mondo, pri kulturo de pardonemo, malegoismo, estas bonvenaj en nia rondo.

Ni ankaŭ spertis ke pluraj kursgvidantoj interesiĝas pri niaj sloganoj por uzi dum siaj kursoj...

### De membroj por membroj:

Ĉiu ajn estas invitata sendi proponon por sekvonta slogano. Interesa sentenco, proverbo, eventuale kune kun akompana teksto estas ĉiam bonvena. Ankaŭ redaktoroj de ĉiaj (Esperanto) revuoj kaj retpaĝoj estas invitataj aperigi la sloganojn en siaj revuoj kaj TTT-ejoj. Ĉiuj bildoj kaj tekstoj estas libere uzablaj...

La teksto sur la dorsa flanko de la levilkarto, prezentita sur la najbara paĝo.

En plej multaj ludoj, kaj ĉefe en bataloj, sportoj kaj konkursoj, unu partio aŭ unu persono estas glora venkanto, ĉiuj aliaj malvenkantoj. Do, unu estas feliĉa, la aliaj malfeliĉaj, tristaj, sed ofte ankaŭ deprimitaj, enviaj, ĵaluzaj, venĝemaj, ĉar oni ne lernis digesti malvenkon. Anstataŭ, ol akcepti la malvenkon, oni malfacile sukcesas paciĝi, ĉefe pro premo de la ĉirkaŭaĵo, aŭ pro timo alfronti la publikon ĉar oni ne respondis al la atendoj.

Jam ekde infanaĝo la sukceso-strebo estas altrudata al la infanoj: oni lernu bone en la lernejo, oni estu lerta, saĝa, kapabla, rapida, ktp. En iuj landoj la premo pri studado kaj kario estas tiel granda ke sinmortigoj sekvas. Ĉu tio vere necesas?

### Donacoj:

Dekomence **Movado sen Nomo** estas asocio kun senpaga membreco... Homoj kiuj tamen opinias ke ili povas kontribui, eĉ per nur malmulto, estas bonvenaj fari tion. Ĝuste tiu ĉi sistemo permesas ke ni povas servi... al ĉiuj homoj...

### Kontakto:

Ĉiuj homoj en la mondo estas bonvenaj al [kontakto\(@\)movado-sen-nomo.org](mailto:kontakto(@)movado-sen-nomo.org) se vi volas aliĝi al **Movado sen Nomo**; se vi havas inspiran tekston por niaj sloganoj; se vi havas kontribuon por nia novaĵletero; ...

*Kore salutas, La teamo de Movado-sen-Nomo*



Platono

*Serĉante la bonon por aliaj,  
ni trovas la propran*

## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 21-jara junulino. Mi ŝatas pentri kaj legi sciencfikciajn kaj latinamerikajn romanojn. Mi tre ŝatas Esperanton kaj volas kontakti homojn de pluraj lokoj.

*s-ino Francisca Reyes Pino*  
Baquedano #406, Villa Oriente  
Rengo  
**Ĉilio** safita\_ki@hotmail.com

Mi estas 34 jara komecanto. **Int:** aŭtoj, kuirado, bakado, naturo, kudri.

*s-ino Gyöngyi Salamon*  
1152 Budapeŝt,  
Kinizsi u. 154,  
**Hungario**  
denon@citromail.hu

Mi estas 40 jara komecanto. Mi estas ekonomiisto.

*s-ro Farley Alencar*  
Rua Pres. Vargas, 157  
Salesianos, 63050-090  
Juazeiro do Norte,  
Ceará  
**Brazilo**  
tiofarley@hotmail.com

Mi estas 44 jara pola esperantisto, kiu nun loĝas kaj laboras en Glasgow, Skotlando. **Int:** lingvoj, geografio, vojaĝoj, historio, naturo, bestoj. Mi deziras trovi leteramikojn.


*s-ro Marek Bamperski*  
Glasgow,  
**Skotlando.**  
m\_bamperski@yahoo.co.uk

Mi estas 25-jara studento en Uppsala, Svedio. Mi ankaŭ laboras, ĉefe per komputiloj. **Int:** lingvoj, matematiko, komputilscienco, biologio, kanti, danci, vojaĝi kaj aŭtoro. Mia esperanto-nivelo estas meza. Mi ŝatus korespondi rete aŭ papere. Se iu volus hejpi min ekzerci mian rusan, ĉinan aŭ francan, mi estus tre dankema. Sed mi ankaŭ volonte parolos nur Esperante.

*s-ro*  
*Carl Mäsak*  
Studentv. 36:208  
752 34 Uppsala  
**Svedio**  
cmasak@gmail.com

Mi estas 44 jara komecantino. Mi estas eks-edziĝinta. Mi laboras kiel servistino en Sanaja Kompanio. **Int:** vojaĝado, muziko, filmoj, kulturo, lingvoj. Mi serĉas homojn kiuj interesiĝas pri familio, lingvo kaj kulturo de aliaj landoj.

*s-ino Wang Min*  
Room 9-603,  
Shenghua Xiaogu,  
No.32, Fufa Rd.  
Kunming, Yunnan,  
**Ĉinio**  
amms888@163.com



Lojkina Nadejda, [Glazov, Rusio]

Mi estas 47 jara. Mi verkas kaj kantas esperantaj kantojn, baldaŭ miaj esperantaj kantoj aperos ĉe Vinilkosmo. Mi serĉas geamikojn de Usono, Brazilo, Kanado, inter 30 kaj 60 jaraj.

*s-ro Theophile Mayoma-Diankembo*  
Bosenge # 5, Ngiri-Ngiri  
Kinshasa  
Demokratia Respubliko  
**Kongo**  
theomayoma@hotmail.com

Mi estas 48-jara sperta esp-isto. Mi serĉas helpanton por ekigi E-kursojn en mia loĝurbo. Ankaŭ mi revas iam ekioĝi en iu latinidlingva lando kun iu aktiva esperantistino. **Int:** E-instruado, instruado de latinidaj lingvoj, poezio, reciprokaj vizitoj.

*s-ro Gazizov Gafurjan*  
Ab.ja.356 Salavat..453266.  
**Rusio** Espoeto@mail.ru

Mi estas 29 jara komecanta esperantisto. Mi laboras en advokatejo. Mi praktikas sporton kaj ŝatas literaturon. **Int:** Scienco, politiko, juro, literaturo, sporto.

*s-ro Alfredo González*  
Dakota 45 B104, Col. Parque  
San Andrés,  
Coy., DF., CP 04040,  
Meksikurbo  
**Meksiko**  
icarus33dragonegroder@hotmail.com

Mi havas 13 jarojn. Mi parolas francan kaj hispanan. Mi volas renkonti knabinon de 13/14 jaroj kiu amas bestojn. Mi havas du hundojn... **Int:** dancoj, muziko...

*s-ino Duparc Audry*  
Tuluzo  
**Francio**  
audryelisa.duparc@free.fr

Mi estas 30-jara filozofio-licenciantino. Mi ŝatas muzikon (roko kaj argentina tango), trinki bieron en teraso dum sunaj tagoj, vojaĝi per kamioneto, ilustritajn librojn por infanoj. Mi ŝatas ankaŭ malnovajn poŝtkartojn, ĉar ili estas tre amuzaj. Mi preferas paper-poŝton.

*s-ino Africa Fernandez Mendez*  
Alameda Cervantes,  
1, 10° B.30800  
Lorca, Murcia,  
**Hispanio**

Mi estas 20 jara studento pri tradukado de la franca, germana kaj moderna greka. **Int:** lingvoj, klasika muziko, danci, japanaj manĝaĵoj. Mia celo estas disvastigi E-ton tra la junularaj rondoj de mia urbo.

*s-ro*  
*Marcos Lopez*  
Avda. Portales del  
Peñón. Finca La  
Gloria,  
s/n. Alhaurín de la  
Torre, 29130.  
Málaga,  
**Hispanio**  
coci-  
endo\_gambas@hotmail.com

**komencanto@r66.ru**

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

